

# ESPERANTO

## TRIUMFANTA

**ELDONANTOJ:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).  
W. M. Page, adv., Edinburgh.  
E. Archdeacon, Paris.  
Joan Gill North, Barcelona.  
Teo Jung, Köln (Kolonjo).  
G. van Heek, Hengelo.  
Frans Schools, Antwerpen.  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).  
**Cef-redaktoro:** Teo Jung.  
**Kun-redaktoro:** M. Butin.  
**Literatura redaktoro:** Zanolni.

**ADMINISTREJO:**  
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.  
Poŝtĉeka konto Köln 70863, por Teo Jung, Köln-Horrem.  
Manuskriptoj oni skribu nur sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

**ABONEJOJ**  
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.  
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrejo per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatoj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

**Aperas semajne.**  
5 dolaroj, 750 guldonoj, 12 svedaj kronoj, 15 avstriaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegiaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 litroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1800 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tujan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroloj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13 Nachtrag, Ergänzungsheft 5, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 2550 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 250 mk.).

**ANONCOJ**  
kostas po cm<sup>2</sup> (kvadracentojmetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCETOJ kostas po 2 foja enprezo kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/2 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/3 jarabono); 1 foja enprezo kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskigo, fianĉigo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunado, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enprezataj senpage.


**Numero 72 :-: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 19. Febr. 1922.**

## Esperanto kaj la Franca Marino (vidu p. 2!)

### La Trentino.

**Situo kaj limoj.**  
Unu el la plej gravaj kaj teruraj fendadoj, kiuj disŝiras la grandan alpan montaron, estas tiu, kiu — je la mezo de la alpkurbiĝo — enfermas la teritorion nomatan de la loĝantoj „Trentino“ kaj de la iama Aŭstria Reĝistaro, al kiu ĝi estis submetita, „Suda Tirolo“. La tuta arko de ĉi tiu teritorio (enhavata de la meridianoj 10° 27' kaj 11° 50' oriente de Greenwich, kaj de la paraleloj 45° 40' kaj 46° 32') estas 6330 km<sup>2</sup>. La limoj etendiĝas 452 kilometrojn, el kiuj 136 apartigas ĝin de la iama Tirolo, 138 de Lombardio, 178 de Venecio.  
Laŭ turista vidpunkto, Trentino estas unu el la plej interesaj kaj rimarkindaj terzonoj de la alpa regiono. Tiu ĉi turista graveco dependas de multaj cirkonstancoj, nome: centra situo de la regiono rilate al preskaŭ ĉiuj eŭropaj ĉefurboj, alifacileco per la Brenner'a fervojlinio; senpera kaj komforta komunikado kun Venecio kaj Milano; multnombro de flankaj intermontaj transirejoj; beleco de la pejzaĝo kaj de la artmonumentoj; diverseco de klimatoj kaj de naturo, kiuj permesas transpasi en malmultaj horoj el la regiono de unu al la aliaj klimatoj; granda nombro da unu-gradaj alpoj supren- kaj iradirejoj; vojkunligoj de valo al valo kun ĉirkaŭaĵoj, kiuj faciligas la promenadon per aŭtomobiloj, al kies cirkulado, male de Svisujo, neniu malhelpo estas intermetita; efikeco kaj famo de la multnombraj mineralaj fontoj; multnombro de alpoj, por ĉiu socia rango taŭgaj restadejoj, tiel, ke tre facila estas la elekto ne nur por tiuj, kiuj deziras unuarangajn hotelojn, sed eĉ por tiuj, kiuj preferas malgrandan loĝejon aŭ modestan gastejon.  
Aldonu la fortan senton de gastemeco ĉe la loĝantoj kaj la gravecon, kiun la tuta lando alskribas al la turista movado! Ĉie starigas kaj prosperas plibeligaj asocioj, kuracdkomitatoj, asocioj por turistaj aferoj, informoficejoj. Jaron post jaro oni plimultigas la hotelojn, rekonstruas kaj rebonigas la malnoviĝintajn, kaj la tuta monta regiono, per laboro de la Trentina Alpinista Asocio, kovriĝadas je densa reto da alpoj ŝirmdometoj.

En aliaj urboj kaj vilaĝoj, same kiel en la altalpa regionoj, la rigardo de vojaĝanto ripozas sur la graciaj linioj de preĝejoj el la kvara kaj kvina jarcentoj kaj sur severaj profiloj de nigraj kasteloj aŭ de elegantaj palacetoj, ornamitaj je belaj kupol-fenestroj kaj artaj pordegoj.



Trento. — Panoramo.

### Montaro.

La Trentino montaro estas karakterizata per varieco. Trentino prezentas sude la tipon de la antaŭalpoj: montetojn ondliniajn, sunplenaĵojn, lagajn spegulojn; kontraŭe norde ĝi prezentas alpinajn kolosojn, kiuj suprenleviĝas je 3000 kaj pli da metroj, kaj karakterizajn glaciejojn, kun vastaj neĝokampoj. Tial estas la glaciejoj „Mandrone“, „Lobbia“, „Lares“, (ĉe Adamelo-Grupo en Val di Genova), „Presanella“, „Nardis“, „La Mare“ (ĉe „Cevedale“) kaj „Careser“ (ĉe „Venezia“-pinto), ĉiuj en okcidenta Trentino; „Marmolata“ en orienta Trentino. La montaro en sia tuteco, krom la notita varieco laŭ maso kaj profilo, prezentas ankoraŭ tute eksterordinarajn formojn. Apud la altaj superregataj de la homoj, ne mankas aliaj grandegaj kaj kruteĝaj pintoj, kiujn neniu homa piedo tuŝis, aŭ kiujn supreniris nur iu glora, ĉu nacia ĉu fremda, pilgrimo; apud monto kovrita je verdaj, alia terurega kaj nudega, sen ia vivo, kaj tiel kruta, ke eĉ neĝo ne aliĝas; la formoj de parieto, kupolo, piramido, piramideto, kasteldento; la herboriĉaj plataĵoj (neforgeseblaj tiuj de „Monte Baldo“), la limigaj ŝtupoj, la malhelaj intermontaj fendadoj, la sovaĝaj arbaregoj (belegaj tiuj de „Paneveggio“, de „Giuribello“ ktp.), la amfiteatroj kun vasta rondrigardo („Val di Non“). Sed plie la scienculo trovas en Trentino apartajn mirindaĵojn, kiuj ne estas malpli ŝatataj de pentristoj kaj fotografistoj. En la okcidenta centro, laŭlonge de iamaj landlimoj, superregas granitaj ŝtonegoj, kaj kontraŭ tiuj ĉi staras unu el la plej admiritaj modeloj de la dolomita orografio, la „Gruppo di Brenta“ (kun „Cima Tosa“), grandioza kunestajo de pintoj, turoj (vulg. „campanili“), grandegaj „kasteloj“, belaj precipe en kelkaj sezonoj kaj iaghoroj, kiam la fantazia scenejo koloriĝas je roz- aŭ violkoloro; mirinda spektaklo por la valoj, kiuj povas ĝin rigardi, neforgesebla memoraro por la vizitanto. Kontraŭe, ĉe la orienta centro, kie superiĝas kalkŝtono, regas la severa „Cima d'Asta“ kun sia vastega granita pinto. Sed multe pli fama, ĉe la norda parieto de la „Avisia“ baseno (apartigilo de iama Tirolo), suprenleviĝas strangaj vulkanaj ŝtonegoj (granitoj, porfiraj, melafiroj ktp.), kiuj tie ĉi kaj tie superkuŝas dolomiton kaj ĝin diversmaniere aliformigas; tien do pilgrimas de preskaŭ unu jarcento geologoj kaj mineralogoj por studi la historion pri formado de l' Alpoj; kaj la riĉeco de mineraloj, kiujn oni amasigas ĉie, kiel en grandegaj naturaj muzeoj, mirigas kaj pensigas la scienculon same kiel la turiston.

malpli malgrandaj kuŝas sur facile alireblaj lokoj. Inter ili oni ne povas forgesi la „Molveno“ lagon (821 m), ĉar ĝi ridentas meze de belega montpanoramo, tiel, ke germana scienculo nomis ĝin „Juvelo de Trentinaj Alpoj“. La lago de „Ledro“ (655 m.), la lagoj de „Caldonazzo“ kaj „Levico“, kie estas la fontoj de la „Brenta“ (449, 440) kaj tra kiuj pasas la Valsugana-fervojo; la lago de „Toblino“ (250 m.) posedas apartan allogon. Kaj logike ankaŭ akvofaloj ne mankas: inter ili memorinda estas tiu de „Nardis“ (en „Genova“-valo), kies akvo devenanta el glacio jetas sin malsupren de preskaŭ 100 metroj. Ĝi estas la plej sovaĝa kaj pentrinda de Trentino. Same la akvofalo de „Ponale“ proksime de Riva jetas sin de alta ŝtupigo en „Garda“-lagon; tiu de la „Fersina“ ĉe „Ponte Alio“, loko je kvar kilometroj de Trento; tiu de „Sardagna“, kiun oni admiras el la jus nomita urbo.

### Mineralaj fontoj.

Parolante pri la akvoj de Trentino, oni ne povas forgesi, ke tiu ĉi estas unu el la italaj provincoj plej bone provizitaj je ĉiuj specoj kaj tre efikaj mineralaj fontoj.

Famaj estas la acidit-ferecaj fontoj de „Pelo“ (1390 m.) kaj „Rabbi“ (1247 m.) en „Val di Sole“; la arsenikecaj de „Vetriolo“ (1490 m.) — „Levico“; la arsenikecaj de „Roncegno“ (m. 505) en Valsugana; kaj la varmeta (duontermaj) de „Comano“ (m. 400), kiujn la romanoj jam konis kaj kiuj troviĝas en meza „Val del Sarca“.

La tuta listo de trentinaj mineralaj fontoj, apud kiuj ekzistas bandomoj, estas la jena:  
„Bresimo“ (1036 m.), fer-saleca; „Carano“ (1086 m.), kalk-magnesleca; „Cavelonte“ (1303 m.), sal-fereca; „Comano“ (400 m.), varmeta, alkali-brom-jodeca; „Roncegno“ (505 m.), fer-arsenikeca; „Rabbi“ (1247 m.), acidit-fer gaseca; „Rumo“ (950 m.), fereca; „Pelo“ (1360 m.), fereca; „Sella“ (870 m.), karb-amoniaka; „St. Orsola“ (925 m.), simila al tiu de Roncegno; „Vetriolo“ (1490 m.), fer-kupr-arsenikeca.

### Klimataj Establoj.

En Trentino, krom la banlokoj, ekzistas multaj klimatlokoj, kiuj estas kompareblaj kun la plej famaj de Svisujo: „Campiglio“ (1515 m.) kaj „Campo di Carlo Magno“ (1670 m.), sur la akvodisigo inter „Noce“ kaj „Sarca“, ĉirkaŭita de ĉarmaj lagoj farigitaj aristokrata kunveno; „Mendola“ (1360 m.) sur la transirejo Inter Bozeno kaj Fondo; en orienta Trentino, la stacio „Primiero“ (715 m.), tiu de „St. Martino di Castrozza“ (1465 m.), kaj tiu de „Pordoi“ (2242 m.). Oni ne forgesu la stacion de „Paneveggio“ (1541 m.) en „Adige“-valo, meze de belega abiarbarego; admirata modelo de la reproduktivo de la kresk-aja regno.

### Lagoj kaj akvofaloj.

Ne mankas en Trentino tiuj ornamatoj, kiuj donas akvon al la montaj vilaĝoj. La „Garda“-lago estas, ĉe sia norda parto, Trentina lago. La regiono enhavas entute pli ol 350 lagojn; plejparte ili estas malgrandaj alpoj lagoj je 1000 ĝis 2900 m. super mara nivelo, tamen granda nombro el la

Inter la klimatlokoj, kiuj estas pli proksimaj al Trento, oni citas: „Molveno“ (821 m.) kaj „Castel Toblino“ (250 m.).

Notinda inter la plej bonaj en suda Trentino estas la stacio „Streva“ (Hotel Dolomiti).

Cetero Trentino posedas en ĉiuj plej bonaj valoj, je malsamaj altecoj, decajn gastejojn por personoj, kiuj vizitas la altajn Alpojn kun forta sento de naturbelaj, malplizorganje la ofte ĝentilaj urban komfortoj, kaj tio precipe ĉe lokoj, kiuj estas taŭgaj kiel forirejoj por ekskursoj kaj supreniradoj.

### Alpaj ŝirmdometoj.

La viziton de Trentinaj montoj plifaciligas multnombraj ŝirmdometoj, kiujn starigis la „Societá Alpinista Trentina“. En kelkaj lokoj, precipe laŭ la lingvolimoj, estas konstruitaj ŝirmdometoj ankaŭ de germanaj Alpasocioj. Iujn ŝirmdometojn laŭ la iamaj italaj landlimoj konstruis la „Club Alpino Italiano“.


### Turistoj vizitu Trentinon.

Trentino estis ĝis nun vizitata prefere de germanaj turistoj. Gastoj el aliaj landoj estis ankoraŭ malmultaj. Ili vizitadas multajn lokojn de la proksima Tirolo kaj alkuras grandnombre al la svisaj valoj; sed la ĉarmo kaj belajoj de l' Trentino ili ne ĝuas. Espereble tiu ĉi artikolo sukcesos atentigi vastajn turistajn rondojn en la tuta mondo pri la Trentino, ĉar vere ĝi meritas esti vizitata kaj admirata. Tial: Turistoj vizitu Trentinon!

Laŭ la gvidlibro „Tra Trentino“ de D-ro Cesare Battisti, tradukita en Esperanto okaze de la kongreso de la italaj Esperantistoj en Trento 1921.



Rovereto. — La Kastelo.



Ala. — Cantore-Placo.

**Verkemaj legantoj ĉiulandaj,**  
vigle kunlaboru ĉe la felietona parto de ET! Atentu la vortojn de nia felietona redaktoro en n-o 71! Sendu originalaĵojn kaj tradukaĵojn, ĉar nun  
**mankegas taŭgaj manuskriptoj.**



# La Lyon'a delegitaro de UEA.



(De maldekstre dekstren.) Starantaj: s-oj L. Gouchon, Thévénat, Jacquemont, Lerouldier, Poncet. — Sidantaj: s-o Ranfaing, s-ino Farges, s-o Sandelyon. (Bedaŭrinde s-o Besombes ne povis ĉeesti.)

Ni eliras kelkajn ciferojn el la raporto pri la agado de la Lyon'a delegitaro de UEA dum 1921 (raporto prezentita al la loka kunveno de 17. januaro 1922):

Dum 1921 la Lyon'a delegitaro administris 101 membrojn: 35 simplaj membroj, 53 membroj-abonantoj, 12 dumvivaj membroj kaj 1 honora membro.

523 korespondaj ricevitaĵoj: 445 leteroj, poŝtkartoj kaj telegramoj; 78 presajoj.

1379 korespondaj senditaĵoj: 542 leteroj, poŝtkartoj kaj telegramoj; 1037 cirkuleroj kaj presajoj. 140 servoj: 34 por komerco; 64 por turismo. 38 trapasintaj membroj.

3 propagandaj paroladoj. 15 artikoloj pri Esperanto.

4 kunvenoj de la delegitaro; 2 kunvenoj de la Lyon'a Sekcio de UEA; 3 cirkuleroj al membroj. 7000 propagandaj folioj.

1 ekspozicio de la E. O. ĉe la Foiro de Lyon. Preskaŭ 4000 francaj frankoj da spezoj:

Enspezoj: 1948,05.

Elspezoj: 2039,05.

Deficito kompensita: 91 fr. fk.

Mono transsendita al I.E.O. en Genève: 1521,80 fr. fk.

Antaŭajn jarojn estis s-o Poncet, delegito; s-o Besombes, vicdelegito (post la morto de s-o Bégel); kaj s-ino Farges, direktorino de la Esperanto-Oficejo.

Car s-o Poncet ne povis daŭrigi sian oficon, la Lyon'a Sekcio de UEA en sia kunveno de 28. januaro 1922 balotis s-inon Farges, delegitinon; s-ojn Sandelyon kaj Besombes, vic-delegitoj.

## Lernejo.

Oficiala prova enkonduko de Esperanto en kvar lernejoj de Leipzig (Germ.). La urbo pagas la kostojn (ĉ. 10000 gmk.)

Je Pasko 1922 la instruado de Esperanto estos prove enkondukata en po unu lernejo de ĉiu urba kvartalo de Leipzig, entute en kvar lernejoj. La instruado komencos kun la 7-a lernjaro, okazos dum du horoj en la semajno kaj daŭros du jarojn. Rajtos ĝin partopreni nur infanoj havantaj bonan cenzuron (1 aŭ 2) en la germana lingvo. Gelerntantoj partoprenontaj la Esp. instruadon ne estos allasataj al alta nedeviga fako. La horoj de la Esp. instruado estos kalkulataj en la devigaj instruhoroj de la instruistoj. La kostojn de ĉ. 10000 gmk. pagos la urbo. — Ni ŝuldas tiun ĉi sukceson precipe al la Saksa Esp. Instituto en Leipzig.

### Franclando.

En Orléans s-o Boubou, instruisto, gvidas nedevigan kurson en la supera porknabina lernejo kaj alian en unuagrada lernejo.

### Hispanio.

S-o pastro Mariano Mojado sukcese propagandas Esperanton en Madrid. Fruktio de lia propagando estas Esp. Grupo ĉe la Centra Normala Lernejo por Instruistoj (str. San Bernardo 80). Li ankaŭ atingis de la Centra Universitato, ke la kunveno de profesoroj akceptis starigon de libera katedro de Esperanto, pri kio ankoraŭ devas decidi la rektoro. La profesoro de la Centra Normala Lernejo sin turnis al la Ligo de Nacioj petante enkondukon de Esperanto en la publikaj lernejoj.

### Ĉeĥoslovakio.

Okaze de la kompletigo de l' demandfolio koncerne la konferencon de Ligo de Nacioj, la Esp. socio „Liberiga Stelo“ en Meierhöfen apud Karlsbad ricevis de la komunumestraro oficialan deklaron tre favoran al la enkonduko de Esperanto en lernejoj. Se estos loko, ni publikigos la tekston de la deklaro en venonta numero.

## Laboristaro.

### New York (Usono).

Esp. Laborista Centro en New York (325 Second Av.) estas SAT-ano. — La sindikato de la bakistoj (4000 membroj) decidis lernigi Esperanton al siaj membroj; kurso okazas ĉiunvespere, gvidataj de f-ino Rosenthal, s-o Schultz kaj s-o Saville. La „Rand School of Social Science“ malfermis novan Esp. kurson.

Dua Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Frankfurt a. M. (Germ.), 12-16. aŭgusto 1922.

### 1-a kaj 2-a Komunikoj (mallongigitaj).

La kongreso okazos de 12-a ĝis 16-a de aŭgusto (samtempe kun la Internacia Sindikata Kongreso de la Ministroj) en la festhalo de la fama restoracio „Frankfurter Konzertgarten“, meze de la urbo.

Kongres-adreso: K-do Jean Roth, Rödelheimerlandstr. 131-III, Frankfurt a. M.-Rödelheim.

Kongres-kotizo: Anglio 3 ŝil., Aŭstrio 100 kr., Belgio kaj Francio 7 fk., Bulgario kaj Rumanio 20 lev., Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio 20 kr., Danio, Norvegio kaj Svedio 3 1/2 kr., Germanio kaj Finnlando 20 mk., Hispanio 4 pes., Hungario 50 kr., Italio 9 lir., Nederlando 2 guld., Polio 200 mk., Svisio 3,50 fk., U. S. A. 80 cend. (pagebla per naciaj monbiletoj aŭ ĉeko).

Aliĝo: Valoraj estos nur la aliĝiloj akompanataj de la kotizo.

Komunikoj: Ĉiu n-o de „Sennacieca Revuo“ (organo de SAT) publikigos unu detalan komunikon de la kongres-komitato.

## Blinduloj.

### Porblindula Ekspozicio en Frankfurt a. M.

Sub la protekto de la Germanregna Blindula Ligo, la plej granda organizado de blinduloj, okazis en Frankfurt Porblindula Ekspozicio. Pro ĝiaj rilatoj al nia Esperanto-afero estos interese ekscii detalojn pri ĝia aranĝo. Ĝi konsistis sisteme el tri ĉefaj grupoj, dividitaj en multaj fakoj kaj montris 1. kiamaniere oni instruas la blindulon (instruo kaj eduko), 2. kiamaniere laboras la blindulo, 3. meciajn, sciencajn kaj artajn produktojn de la blinduloj. Rilate al 1. meritas mencio la demonstraĵa tabeloj pri la punktoskribo de Barbier, pri la reliefpunkta sistemo de Braille, kiu estas la nun ĝenerale uzata, pri ĝia apliko en la mallongiga skribo kaj noto-skribo, diversaj skribaparatoj kaj -maŝinoj; de la 2-a grupo krom la konataj blindul-profesoroj la blinda ŝpinistino, en nacia kostumo, la surd-blinda infano, la produktaj de blindaj sciencistoj (Backes, Laboroj pri la Tezo de Fermat [Matematiko]), blindaj komponistoj kaj skulptistoj, blinda skribmaŝinisto. En la venda fako korbplektaĵoj, brosoj, fadenaĵoj, permane kaj permaŝine trikitaĵoj, manlaboraĵoj de vitrinaj, rilate al 2. ankoraŭ: la blindulo en la industrio.

Specialan intereson por niaj samideanoj havis la fako „Esperanto kaj la blinduloj“. Ĝi montris pli impresige kaj konvinkige, ol elokventa paroladisto tion povas fari, la utilon de Esperanto por la blinduloj. Kiel ĉefajo oni devas atenti la vortaron de Christaller transskribitan en Braille'a skribo. Ĝi estas kolektiva laboro de la Frankfurta Blindula Esperanto-Grupo. Suplemento al ĝi pri la mallongigo-skribo aperos en venontaj tagoj. Krome oni povis vidi reliefpunktan literaturon. Entute tamen estus dezirinde, ke samideanoj akcelu la kreon de tia literaturo per praktika kunlaboro. Tre rimarkinda estis plue la elmerita „Esperanto-Ligilo“ kaj korespondajoj de blinduloj. Multaj tabeloj kaj alia materialo vidigis la avantaĝon de Esperanto por blinduloj. Interesa estis la tabelo pri la epketo rilate al uzo de Esperanto en blindul-institutoj. 30 lernejoj respondis al ĝi. La publiko estis speciale atentigata al reliefpunkta letero de blinda japano pri nova germana eltrovaĵo.

La ekspozicio estis inda monstrejo por altiri la intereson de la publiko al la agado de la blinduloj. Ke ĝi samtempe helpis propagandi kaj eĉ antaŭenpuŝi ĝian fakon en la antaŭ-scenejon, ni dankas al la direktoro de la Frankfurta Blindul-instituto s-o Grasmann kaj ĉefe al la senlaca pioniro por utiligo de Esperanto al la blinduloj s-o Max Urban, instruisto en la blindulejo. Li estas ankaŭ la ĉefredaktoro de la nova blindulvortaro kaj iniciatigis ĝian verkadon.

Interese estas ankoraŭ noti, ke la ekspozicio estis aranĝita en unu el la haloj sur la grandega tereno de la Internacia Foiroj de Frankfurt a. M.

Robert Kreuz,  
direktoro de la Esp. Fakoj de  
la Foiroj de Frankfurt a. M.

Informoj pri la blinda Esperanto-laboro en Germanujo estas haveblaj pere de s-o Max Urban, Blindenanstalt, Adlerpflanzstrasse 8, Frankfurt a. M., Germanujo.

## Nia movado en Rumanio

viglas. Kursoj estas en Targo (Targul-Mureş) gvidataj de s-oj Tövisy kaj prof. Baboş. Nia kara s-ano J. Halasz per grandanima donaco pliriĝis la targan urban bibliotekon per multaj gravaj Esp. verkaĵoj.

En Lupe ni s-o Eissen komencis novan kurson. Ankaŭ en Orşova estas gvidata Esp. kurso de s-o Dudaş.

En Cluj, kie antaŭ nelonge estis grandstila propaganda ekspozicio (vidu ET n-o 61), — la tie elmontrita grandioza mondkarto vekis grandan

intereson ankaŭ en seriozaj sciencaj rondoj. La Cluj'a Universitato sendis oficialan komitaton, kaj sekve de la favora raporto de l' komitato la Universitato aĉetis la mondkarton, kaj oni tuj aplikis s-on artiston A. Peter kiel desegniston ĉe la Kartografia Instituto de l' Universitato. Do nia s-ano Peter, kiu volonte helpadis al ni, laborinte dum la noktaj horoj krom sia oficiala poŝtdeĵoro, ricevis la merititan premion pro sia sindonemo.

La Cluj'a gazeto favore traktas la leteron de la Ligo de Nacioj. Tiurilate grandaj artikoloj aperis en la rumanlingva „Vointa“ de 30. jan. kaj en la hungarlingva „Ellenzek“ de 1. febr.

La rumanlanda samideanaro fervore eklaboras konsciante pri la graveco de l' nuna jaro. S-o Giuglea, sek. de la Rumanlanda Esp. Societo per la Bukureŝt' aj gazetoj faris alvokon al la ĉefurba Esperantistaro.

Ke la Landa Societo ree ekfunkciis, tion pravas la fakto, ke la Ekzamena Komitato post la milito la unuan fojon eldonis oficialan Esp.-profesoran diplomon por s-o Csiky, kiu instruas en Fagaraş.

Ni insiste petas la rumanlandan Esperantistaron por plua serioza laboro, kunhelpado kaj konstanta varbado de niaj anoj.

Aliĝi al UEA kaj abonati kaj abonigi ET, en kiu gazeto aperadas raportoj pri ĉiuj gravaj okazaĵoj — estu la devo de ĉiu samideano!  
Tiberiu Morariu.

## Komerco.

### Ĉeĥoslovakaj komercaj ĉambroj por Esperanto.

Demandite de s-o Cuzon, reprezentanto de la Pariza foiro, respondis la komerca ĉambro en Hradec Králové jene: Ni dankas por viaj klarigoj rilate Esperanton. Rekonante la gravecon de Esperanto por la komerco, ni estas pretaj helpi al propagando de ĉi tiu lingvo en nia regiono, interalie ankaŭ per starigo de senpaga tradukejo Esperanta por niaj membroj.

La komerca ĉambro en Brno dankis al la nomita sinjoro pro la informoj kaj finas la leteron sekve: Ni konas la utilecon de la internacia lingvo Esperanto kaj ni uzos ĉiun okazon por helpi al disvastigo de ĉi tiu lingvo.

Same sin esprimas la komerca ĉambro en Olomouc.

### Svisa Specimena Foiro.

La direkto de la Svisa Specimena Foiro en



Al'Artikolo „La Trentino“: Alta Montaro. -- Dolomitoj.

Basel informas nin, ke ĝi pretigis bele ilustritan Esperantan prospekton, kiun ĝi dissendas senpage. Krome ĝi decidis starigi specialan Esperantofakon sub la gvidado de s-o red. Unger. La Svisa Specimena Foiro en Basel uzadas Esperanton jam de post tri jaroj;

ĉi tiu ĝi esperas, ke Esperantistoj el ĉiuj landoj vigle postulos la prospekton pri la nunjara foiro, okazonta de la 22. aprilo ĝis la 2. majo 1922. Speciale ĝi atentigas pri sia Informa Servo, kiu laboras tute senpage; ĝi estas al la dispono de ĉiu, kiu deziras ricevi informojn pri la svisa merkato aŭ pri Svislando ĝenerale. Dum la foiro okazos aparta Esperanta Vespere kun publikaj paroladoj; ĝin aranĝas la „Internacia Komerca Revuo“ kaj la Svisa Asocio por Komerca Lingvo sub alta protekto. Adreso: Svisa Specimena Foiro, Esperanto-Fako, Basel, Gerbergasse 30.

### Internacia Foiro de Libroj en Firenze.

En venonta printempo okazos en Firenze (Italio) Internacia Foiro de Libroj, grava aranĝo por vendo kaj aĉeto. Ĉiuj Esp. libro-eldonistoj devus aliĝi kaj sendi Esp. librojn. Oni postulu tuj informojn kaj aliĝilojn de Fiera Internazionale del Libro, Via Cavour 20, Firenze, Italio. La aliĝiloj devas esti resendataj ĝis 28. febr.

### Okazontaj Foiroj kaj Ekspozicioj.

19.-24. febr. Printempa Foiro Königsberg.  
21. febr. ĝis 3. marto Internacia Foiro Utrecht.  
27. febr. ĝis 10. marto Intern. Industria Foiro Utrecht.  
27. febr. ĝis 10. marto Ekspozicioj de kemiaĵoj, farboj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj en London kaj Birmingham.  
Febr.-marto Werkbund-ekspozicio en Stuttgart.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

### Nederlando.

En Alkmaar s-o Preller gvidas tri kursojn ĉiulunde: unu por knabinoj, alian por knaboj kaj trian por plenaĝuloj.

### Italio.

En Napoli, kie ĝis nun apenaŭ estis movado, Esperanto nun komencas konatiĝi. Revuo „Rinascita“ post trafaj propagandaj artikoloj iniciatis lecionojn de Esperanto; ĉe la kultura kaj arta societo „Rinasella“ starigis sidejo de Esperantistoj. Prez. Kav. R. Ricciardi estas elektita delegito de Itala Federaco. S-o Cesarini baldaŭ komencos kurson ĉe la reĝa Mara Instituto. — En la ĉarma proksima urbeto Portici, ĉe instituto „Casa Matera“ okazis parolado de s-o Cesarini; kurson gvidos prof. Chiappari. La paroladon oni ripetos en aliaj institutoj de Napoli.

### Franclando.

En Orléans la urba konsilantaro donis al la grupo subvencio de 200 fk. Vidu ankaŭ sub „Lernejo“!

En Colombey-les-Belles (Meurthe et Moselle) fondiĝis grupo (prez. André Gérard, advokato).

### Hungarlando.

En Miskolcz fondiĝis loka grupo de Hungarlanda Esp. Societo.

### Ruslando.

Laŭ raporto de s-o M. S. Valentinov en Moskvo, fondiĝis novaj Esp. societoj en: Nikolajev (Ĥersona gub.), Samarkand, Pskov, Igumen (Minska gub.) kaj Kamensk (Dona regiono). — Rondetoj en Ananjev (Ĥersona gub.), Turinsk (Tobola gub.), Ĥorel (Poltava gub.), Pustoŝka (Vitebska gub.). — Novaj kursoj en: Ĥerson, Ekaterinoslav, Ĉita, Astraĥan, Slavjanskaja (Kubana regiono). — Esperanto en lernejoj: Barnaul, Jaropolec kaj Volokolamsk (Moskva gub.), Igumen. — Novaj eldonaĵoj: en Petrograd n-oj 2-6 de „Esperanta Informilo“, en Kamenj „Informa Folio“, en Arĥangelsk rusa filatelisto ĵurnalo kun Esp. fako, en Kronstadt „Sub la Verda Standardo“.

### Usono.

Societo „Harmonio“ en New York estas tre agema; Ferrer Modern Sunday School (dimanĉa lernejo) enkondukis Esperanton kiel instrufakon. En Detroit, Mich., funkcias grupo kun 65 membroj. Kurso okazas vendrede, leg- kaj parol-vesperoj marde.

Nova grupo en Rockford, Illinois.

Vidu ankaŭ sub „Laboristaro“!

### Hispanio.

En Madrid fondiĝis Esp. Grupo de la Centra Normala Lernejo por Instruistoj kaj Skolta Esp. Grupo.

Propagandaj kunvenoj en Bilbao kaj Santander okaze de vizito de holandaj samideanoj Stoeltje kaj Seubring biciklantaj ĉirkaŭ la mondo.

Festoj de la aŭstraj geinfanoj gastigitaj en Vich.

### Svedlando.

En Korsnäs anonciĝis 15 personoj por kurso. En Gislaved 15 abstinenculoj lernas Esperanton. Aliaj kursoj en Hallstahammar (15 p.), en Vansbro (20 p.), Nordingräs kaj Ullanger (po 5 p.). Kurso aranĝata en Västerås. Grupo fondota en Umeå. Paroladoj en Malmö kaj Ystad.

### Finnlando.

La libertempajn Esp. kursojn (2.—12. jan.) ĉe la Esp. Instituto de Finnlando en Helsinki partoprenis 95 personoj (30 en supera, 14 en meza, 51 en elementaj kursoj) el la lokoj: Helsinki, Kouvola, Seinäjoki, Tampere, Kuopio, Tuulos, Kiiikka, Turku, Sortavala, Rauma msk., Sulkava, Harjavalta, Orimattila, Lannevesi, Pleksämäki, Luumäki, Suomasjärvi, Joutseno, Toholampi, Malm, Valimo, Ulvila, Joroinen, Rautalampi, Pornainen, Tarto (Estonio).

En Laihla okazis kvintaga Esp. kurso (27.—31. dec.) por deko da partoprenantoj el diversaj lokoj. En Teuva kurso kun ĉirkaŭ 40 p. Societo fondiĝis kun 30 membroj.

### En Uerdingen apud Rejno (Germ.)

s-o Brockmann gvidas kurson kun 11 partoprenantoj. Kunveno ĉiunmarde.

## Scienco.

### Ameriko.

Laŭ „Amerika Esperantisto“ la Amerika Asocio por Antaŭenigo de la Scienco en sia kunsido de 30. dec. en Toronto (Kanada l.) pritraktis la urgan bezonon de internacia helplingvo kaj nomis komitaton por sin informi pri la afero.

## Nekrologo.

La 10. dec. 1921 mortis en Petrograd, Ruslando, la konata rusa Esperantisto, s-o Timoteo Ŝevinskij (Markizo de To. Ŝo.), ano de la Lingva Komitato (rusa sekcio), aŭtoro de plena Esp. lernolibro, de originala verko „Kometo de Galeo“ ktp.

## Abstinenculoj.

En Gislaved (Svedlando) okazas Esp. kurso por 15 abstinenculoj.

## Gazetaro.

De Camera (La Kamero), Schoonhoven, Nederl., 1. febr. (Artikolo pri Internacia Foto-Ekspozicio en Antwerpen, laŭ ET.)

Tidskrift for Dansk Rode Kors (Revuo de Dana Ruĝa Kruc), Kopenhago, febr. (8-paĝa artikolo de s-o M. Blicher pri „Ruĝa Kruc kaj Esperanto“.)

El Artesano, Barcelona, febr. (Fino de artikolo de s-o Ferrer pri la XIII-a.)

Guía Profesional, Barcelona, jan. (Art. „Iom pri Esperanto“, de V. Andra.)

La Tarde, San Fernando, Hisp., 2. febr. (Art. pri Esperanto, de s-o Maraury.)

Nieuwe Hengelose Courant, Hengelo, Nederl., 8. febr. (Art. „Esperanto inter la blinduloj“, laŭ ET.)

Le Petit Parisien, Paris, 31. jan. (Esp. kaj la komerco). 4. febr. (Esp. kaj la literaturistoj, de konata verkisto s-o Frappié)

Volkstribüne, Meß, Franc., 10. febr. (Esp. angulo, kiu aperas de post okt. 1921 trisemajne.)

Leipziger Abendpost, Leipzig, 6. febr. (Esp. instruado en lernejoj de Leipzig)

Traunsteiner Wochenblatt, Traunstein, Bavario, 4. febr. (Kun ĉefartikolo pri Esp.)

Danziger Volksblatt, 4. febr. (Artikoloj pri Esp.)

Volkszeitung, Bromberg, Pol. N-oj de 7. kaj 28. jan. kaj 5. febr. kun Esp. anguloj.

„Esperanta Finnlando“ de januaro nomas 26 gazetojn, kiuj dum decembro 1921 aperigis entute ĉ. 55 artikolojn pri Esperanto kaj la Esp. movado.

## Necesaj dokumentoj por ĉiuj Esperantistoj.

Historio de la Universala Kongresoj:

	Prezo fr. frankoj
Oficiala raporto pri la 1-a en Boulogne	0.50
" " " " 2-a en Genève	1.50
" " " " 3-a en Cambridge	2.—
" " " " 4-a en Dresden	2.—
" " " " 5-a en Barcelona	2.—
" " " " 6-a en Washington	1.—
" " " " 7-a en Antwerpen	3.—
" " " " 8-a en Krakow	3.—
" " " " 9-a en Bern	3.—
" " " " 10-a en Paris	2.—
" " " " 11-a en San Francisco	2.—
" " " " 12-a en Hago	3.—

### Lingvaj demandoj.

Zamenhof, Pri reformoj en Esperanto (elĉerpaĵo el „Esperantisto“ 1894)	0.50
Fundamentaj dokumentoj pri la Konstanta Komitato de Kongresoj (1909)	0.25
Fundamentaj dokumentoj pri la Oficiala Instituto de Esperanto (1913)	0.25
A. Wackrill, Zamenhofaj vortoj ne trovblaj en la Universala Vortaro	1.—

Bonvolu aldoni al la antaŭpagotaj prezoj 10% por sendelspezoj kaj sendi ĉiujn mendojn al la

Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris 9.

	Prezo fr. frankoj
Cart, 1-a kaj 2-a oficialaj aldonoj al la Universala Vortaro	po 0.50
G. Moch, Pri la transskribo de propraj nomoj	1.—
G. Moch, Pri la elparolado de Esperanto	1.—
<b>Bibliografio.</b>	
Bibliographie de l'Esperanto et la classification décimale universelle (france)	0.50
Emploi de la bibliographie de la langue auxiliaire internationale Esperanto (france)	0.50
Internacia Muzeo en Bruxelles (kun fotografajoj)	0.30
Bibliografio de Esperanto (ĉiuj verkoj pri aŭ en Esperanto de 1887 ĝis 1903)	2.—
<b>Diversaĵoj.</b>	
Serio de poŝtkartoj de la Boulogne'a kongreso (malofaĵoj)	2.—
Biografio de Karlo Bourlet (kun portreto)	0.75
<b>Gazetoj.</b>	
„La Oficiala Gazeto“, diversjaraj kompletaj kolektoj	po 5.—
„France-Esperanto“, plena kolekto 1915—1919, interesa dumviva dokumentaro	5.—

## Internacia Foiro en Praha

IV-a Foiro: 12.—19. Marto 1922

V-a Foiro: 3.—10. Sept. 1922

Bonvolu adresi informojn al la konsuloj de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, la oficialaj reprezentantoj de la foiro kaj al

### Foira Oficejo, Praha I

Staromestská radnice.

Telefonnumeroj: 7434 kaj 9140. — Kabloadreso: Foirofoicejo Praha.

## Internacia Ekspozicio pri modernaj domaj konstruaĵoj, Torino (Italio), Aprilo-Majo 1922.

Materialoj — Maŝinoj — Konstruaj sistemoj — Modeloj — Projektoj — Fotografajoj — Libroj — Jurnalaj, ktp.

Firmoj konstruantaj lignajn domojn, specialajn sistemojn per betono, ligno, brikoj, ktp., estus dezirataj.

Petu tuj informojn kaj aligilojn de Ing. Balzac, membro de la Ekspozicia Komitato, Via Parini 10, Torino (Italio).

## Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg.  
 Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beersstraat, Antwerpen.  
 Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.  
 Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.  
 Estona: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast 6, Tallinn.  
 Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.  
 Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.  
 Hispana: Konrado Doménech, Geron, Rambla Alvarez 12 2.  
 Hungara: Paŭlo Balkanyi, Halos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.  
 Japana: Morizo Oa, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.  
 Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).  
 Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.  
 Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.  
 Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.  
 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

### La mondo ne scias,

ke vi estas Esperantisto kaj ilal vi ne povas plene uzadi la preferojn de l' internacia lingvo

### La mondo deziras

eksciti ne sole vian adreson, sed ankaŭ vian okupon, aĝon, inklinojn, opiniojn por interrilati kun vi

### Vane vi serĉas

ĝis nun samideanojn, kiuj respondus al viaj deziroj, kiuj povus efike subteni vian celadon, helpi ĉe kolektado aŭ komercado, prizorgi informojn

### Vi trovos ilin

se vi aĉetos „BES-an Adresaron de Esperantistoj el ĉiuj landoj“ — kaj

### vin trovos la mondo,

se vi metos vian adreson aŭ anoncon en la jarlibron: „BES-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj“.

3-a eld. (1921): 1.50 sv. fk. — Aliga koltizo: 1 sv. fk.

Anoncoj:  
 1 pg. 30. — sv. fk., 1/2 pg. 15. — sv. fk., 1/4 pg. 8. — sv. fk.,  
 1 linio 1 — sv. fk.

1 sv. fk. = 6 kč. = 12 gmk. = 4 resp.-kup.  
 Aligojn kaj anoncojn por 4 a eldono oni akceptas sole ĝis 1. III. 22.

Eldonanto:  
 BOHEMA ESPERANTO-SERVO  
 Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo

## Mur-bildojn

garantie arte pentritaĵoj per diversaj koloroj sur la interna vitroflanko, laŭ ĉiuj motivoj, en vere bela maniero (grandoj 6:9, 9:12 kaj 15:18 cm) fabrikan kaj eksportas ĉiulanden je mirige malaltaj prezoj

Firmo Emil Weiler, arlaborejo por vitropentrado, Freiburg i. Br., Germ., Emmendingerstr. 30. Kapablaj reprezentantoj dezirataj.

### ŜANĜO DE ADRESO.

De la monato februaro mia nova adreso estas: Stefano Pedrazzini, de Missas Pedrazzini and Company, Arispe (Sonora, Mexico). Deziras provumerojn de Esp. gazetoj kaj katalogojn.

EN UERDINGEN apud Rejno, Germ., oni renkontas Esperantistojn ĉiutage post la 8-a vespere en hotelo Burghof.

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

F-ino Heda Tyroler, Timiŝoara II, Hauptstr. 44, Rumanio, Banato, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun samideanoj en la tuta mondo.

S-o Geza Dlovzegi, fervoj-oficisto, Timiŝoara III, str. Havel 28, Rumanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

S-o Julio Kolofon, fervoj-oficisto, Timiŝoara IV, str. Grün-anker 8, Rumanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

S-o Geo Kvejtman, Lodz, Pjezard 14, Pol., deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj, interŝanĝas monbiletojn, gazetojn k. a.

S-o A. Lubelczyk, posedanto de presejo kaj stampejo en Biata Podlaska, Polio, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj kun la tuta mondo.

S-o K. Malycha, strato Jenerala Bema 9 (P. K. U.), Bydgoszcz, Pol., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., ankaŭ poŝtmarkojn.

S-o A. Welasbrodt, strato Lokietka 26, Bydgoszcz, Pol., preferas korespondi per poŝtkartoj ilustr., interŝanĝas evit. poŝtmarkojn.

S-o Johano Varadi, Budapest VI, Szondi u. 38-II-17, ne havas ankoraŭ korespondantojn, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.

S-o Albert Schaeckels, Kattenberg 28, Borgerhout, Antwerpen, Belgio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. (bfl.), ne kun Germanio kaj Hungario.

## Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau) Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj. Prokuras komercajn adresojn. Prizorgas la anoncadon en Nederlando. Interrilatisigas kun nederlandaj komercistoj kaj industristoj. Sciligas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

## Art-Amikoj,

Artaĵo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,

kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5. Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

## La mondfama slovakaj vilaĝana manlaboroj!

Broderojn, jakojn, tablotukojn, puntajn kurtenojn ktp. mi rekomendas je plej favoraj prezoj. Okaze de mendoj oni povas pagi ankaŭ per fremdaj valutoj. Kun la eksterlando mi korespondas nur en Esperanto aŭ en germana lingvo. Informojn petu de D. Rakovszky, Sered, Slovakio Zupa Bratislava.

## UNUJ PAŜOJ

Facila libro por lerneja legado.

Tradukis kaj aranĝis Alexandra Mexin. Rakontetoj el diversaj aŭtoroj. — Tradukoj el 16 lingvoj. — Galicismoj, ruscismoj, germanismoj. — Popolaj fabeloj kaj proverboj.

Prezo 2 sviz. fk.

Specialaj kondiĉoj por landoj kun malalta valuto.

Havebla ĉe:

E. D. I. P. (Edit. Intern. Populaires) Genève, Svizl., Passage Terraillet, 18

## Anoncetoj.

GEEDZIOOJ. — Wil y Thiele, Friedel Thiele nask. Hüblrich, salutata kiel geedzoj. — Zittau (Saksujo), Böhmische Str. 8, III. kaj Helmbrechts (Bavarujo).

LA PLEJ FAMA SONORIL-KONCERTO en la tuta mondo okazas en Mechelen (Mallinea) apud Aniverpeno en Belgio. Petu informojn de: Inlichtingsbureau (Inform-oficejo), Bruel 125, Mechelen.

GVIDLIBRETO DE ANTVERPENO. Sendu simplan internacian respond-poŝtkarton al s-o Frans Schoofs, del. UEA, 45, Kiekle Beersstraat, Antwerpen (Belgujo), por tuj ricevi belan, ilustritan, 32-paĝan broŝuron pri la urbo Antwerpen, sidejo de nia VII-a Kongreso.

REVENDISTOJ DE ESPERANTAĴOJ. Aperis libro „La malbonaj flankoj de sporto“. Bonvolu ĝin mendu tuj, ĉar estas ankoraŭ sendebila rekte el presejo, kio evitas duoblan afrankon. — J. Vahikeri, Luisentall 5-11, Tallinn, Estonio.

AL. MEXIN. del. UEA, Montreux (Svislando), Grandrue 65 petas jenajn personojn komuniki sian adreson: 1. s-ino Agnes Laurens, Rotterdam. 2. f-ino Amalia Nunez, Pampelona, 5 s-o Luigi Puppo en Italio, 4. s-o Jakob Dembo, Jonava (Litovio). — Petegas skribi legeble la adresojn!

POSTMARKOJ! Kontraŭ 3 svizaj frankoj aŭ 3 danaj, svedaj, norvegaj kronoj aŭ kontraŭ egalvaloro de samaj, mi sendas 200 diversajn belajn poŝtmarkojn de Slovakio kaj Hungario. — Adreso: Johano Kratochvilla, instruisto, Sered, Slovakio.

RAPIDIĜU ALIGILOJ! nova (4-a) eldono de „BES-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj“! Aliga koltizo: 1 sv. fk., 6 kč., 12 gmk. aŭ 5 resp.-kup. — Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

S-o Ernesto Gani, 21-jara dentisto, Timiŝoara IV, Rechte Bega Zelle 49, Rumanio deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn (bfl.) kun samideanoj en la tuta mondo, precipe dentistoj.

S-o Stefano Sippay, Mialkocz, Serhaz u. 42, Hung., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun tutmonda samideanoj kaj serĉas laboron en eksterlando kiel preseja maŝinisto.

S-o Stefano Girardini, Budapest VII, Izabella ter 7-I-15, ne havas ankoraŭ korespondantojn, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.

F-ino Marlia Lukoševičaitė, Dotnava, Z. U. mokykla, Litovio, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

Denia Dielen, Ploenstraat 1, Berchem-Antwerpen, Belgio, instruisto, deziras korespondi per leteroj kaj per ilustr. poŝtkartoj kun la tuta mondo.

I. Nagamura, Imperia Universitato, Fuknoka, Japanujo deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (pm. bfl.), leterojn kaj gazetojn.

Herman Honovalov, Teatralnaja pl., 6, 9, Nijnij Novgorod, Rusio, deziras korespondi per leteroj kun universitataj geŝtudentoj, per poŝtkartoj ilustr. (bfl.), nur vidaĵoj de teatroj; interŝanĝas gazetojn.

S-o Alfred Sover, Tartu, Estonio, deziras korespondi kun lertaj samideanoj pri amo kaj amuzaj aferoj. — Interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o Malewski sendas por 60 gmk 36 dentumitajn kaj 51 nedentumitajn poŝtmarkojn de Meza Litovio. Por 40 malsamaj poŝtmarkoj mi sendas 30. Wilno, Wilenska 27-7, Meza Litovio.

Wl. Reszka, gimn. instr., Cholnice, Pol., Placo Król. Jadwigi 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri sporto.

S-o Josef Vogel, Salzburg, Aŭstrio, Wolfriedrichstr. 7, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun ĉiuj landoj.

S-o Kazimierz Dmoslawski, kunlaboranto de soc. gazetoj, Warszawa I, poste restante, serĉas ĉiulandajn seriozajn korespondantojn pri laborista, socialista movado kaj ĝenerale pri politika vivo en ĉiuj landoj. Interŝanĝe sendos samajn informojn el Poljo.

F-ino E. Plińskedicaite, Šiauliai, Mazoli Posadna 4, Litovio, deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝadi poŝtmarkojn kaj papieronon.

S-o Walter L. F. v. d. Have, Krabbenbosweg 155, Hengelo (O), Nederlando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun la tuta mondo, precipe kun fraŭlinoj; interŝanĝas ankaŭ gazetojn, Esperantaĵojn kaj poŝtmarkojn.

S-o Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Averspergstr. 54, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun ĉiulandanoj.

S-o Willy Weilepp, juna instruisto, Merseburg a. S., Haackestr. 2, Germanio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj. Interŝanĝas ankaŭ pm.

S-o Osw. Wittig, komercisto, Merseburg a. S., Germ., Klausentor 3, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandanoj, precipe fraŭlinoj.

La gimnazia Esp. grupo Oppeln, Supra Silezio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj nur kun aliĝingvanoj. Bonvolu adresi al la prezidanto Jozefo Kohe, Oppeln, Karlsru. 92.

Por ĵus finigataj du kursoj estas serĉataj gekorespondantoj por 40 kursoj por povi interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.), leterojn kaj poŝtmarkojn. Adreso: Walter Zinke, Chemnitz-Rottluff, 12 B, Germanujo.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobriy Germanlando, serĉas tutmondajn gekorespondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo, prefera pedagogia; donas komercajn informojn.

35 fervore lernantaj geknaboj (11-15 l.) serĉas samaĝajn gekorespondemulojn. Ilustr. poŝtkartoj al instr. Friebe, popola lernejo Dresden-Dobriy, Germanlando.